

LA UNIVERSALA DOMO DE JUSTECO

Oktobro 2019

Al ĉiuj honorantaj la Heroldon de nova Tagiĝo

Elkore amataj geamikoj,

konsideru kun ni. Ĉiam, kiam aperas en la mondo dia Edukisto, Personeco Kies instruoj dum jarcentoj venontaj la homan pensadon kaj agadon formos – kion atendu ni je tia drama, sisma momento?

La apero de ĉiu tia Edukisto, kiel estas registrita en la Sanktaj Tekstoj de la grandaj kredsistemoj de la mondo, estas pivota evento antaŭenpelanta la avancon de la civilizacio. La spirita stimulo, kiun tra la tuta historio provizis ĉiu el ili, ebligis ke pluetendiĝis la radiuso de homa kunlaboro de la klano al la tribo, al la civito, kaj al la nacio. Kaj ĉiu el tiuj ĉi grandaj Instruistoj promesis ke ĝustatempe aperus alia dia Personeco, Kies alvenon endus anticipi kaj Kies influo reformus la mondon. Ne surprize do, ke la alveno de Báb, Kies Naskiĝon antaŭ du jarcentoj nun ni honoras, estigis en la lando kie Li naskiĝis senprecedencan fermentadon. La momento de Lia apero, kiel la apero de ĉiuj tiaj Personecoj, ekliberigis potencajn spiritaĵojn – sed ne estis akompana spektaklo. Okazis male, en modesta persa hejmo, je malfrua vespero konversacio inter religiostudento kaj ties juneca Gastiganto, dum kiu tiu Gastiganto rivelis, ke estus Li la Promesito, la dia Edukisto, kiun Lia gasto estis serĉanta. »Observu atente«, rimarkigis Li, »Ĉu ne eblas ke la Persono celata ... estas neniu alia ol Mi?« Estas tiu ĉi Junulo, la Báb, Kiun ni aklamas kiel Tiun Kies veno – post miljara intertempo – refoje verŝis la lumon de dia gvidado sur la homan mondon.

El ĉi tiu unua momento disvolviĝis ĉio, kio de tiam okazis. La Verkoj de Báb abunde elfluis Lian plumon, malkovrantaj profundajn verojn, sensignificantaj superstiĉojn Liaepoke havantajn fortan influon, instigantaj la homojn agnoski la signifon de tiu tempo, severe riproĉantaj la hipokritecon de iliaj gvidantoj, kaj alvokantaj la mondon al sublimeskonduktnivelo. »Ho popoloj de l' tero!« deklaras Li en unu el Siaj ĉefaj verkoj, »Vere, aperis inter vi la brilega Lumo de Dio ... ke ĝustavoje estu vi gvidataj al la paco kaj, per la permeso de Dio, elpaŝu vi el la tenebro en la lumon kaj sur tiun ĉi vastan Padon de Vero.« Lia influo disvastiĝis kun eksterordinara rapideco, etendiĝanta preter la limojn de Persio. Observantojn mirigis same la rapide amasiĝanta nombro de Liaj sekvantoj kaj iliaj nesuperite kuraĝaj kaj sindonaj agoj. Rakontoj pri la vivo de Báb – pri ĝia rapida disvolviĝo kaj la tragika dramo finiginta ĝin – igis scivolajn animojn vojaĝi al Persio kaj enketi plu, kaj inspiris gamon da artaj omaĝoj al Lia Persono.

La brilego de la lumo de Báb ŝajnas esti eĉ pli blindiga, kiam oni ĝin konfrontas kun la tenebro de la socia medio, en kiu aperis Li. La Persio de la deknaŭa jarcento havis plu nenion komunan kun sia zenito, kiam ĝia civilizacio estis la envio de la mondo. Regis nun malklero, sensencaj dogmoj restis nekontestitaj, malegalecon nutris senbrida korupto. La religio, la fundamento de la eksa prospero de Persio, estis fariĝinta korpo tute sen viviganta spirito. Al la subigitaj amasoj ĉiu novalvenanta jaro ofertis sole seniluziigon kaj senesperon. Subpremado kompletis. Tiam, samkiel printempa ŝtormo, venis la Báb por senmakuligi kaj purigi, por elradikigi la velkajn kaj eluzitajn kutimojn de kaprica epoko, kaj por forlavi la obskurigan polvon el la okuloj de tiuj blindigitaj de iluzio. Sed Báb havis specialan celon. Li provis prepari homojn por la tuj okazonta apero de Bahá'u'lláh – la dua de la Ĝemellumoj destinitaj alporti novan lumon al la homaro. Ĉi tio estis Lia plej insista temo. »Kiam eklumos la Tagstelo de Bahá super la horizonto de l'eterno«, instrukiis Li Sian sekvantaron, »devas vi prezenti vin antaŭ Lia Trono.«

Tiel Báb kaj, eĉ pli brilege, Bahá'u'lláh iluminis socion kaj epokon vualitajn en obskuro. Ili inaŭguris novan stadion en la socia evoluo: la stadion de la unuigo de la tuta homa familio. La spiritaj energioj de Ili elverŝitaj super la mondon inspiris novan vivon en ĉiu sfero de homa strebado, kies rezultoj evidentas per la transformiĝo okazinta. Materia civilizacio avancis nemesureble, mirigaj trarompoj en scienco kaj tekniko estas atingitaj, la pordoj al la amasigitaj scioj de la homaro estas vaste malfermitaj. Kaj principoj, kiujn proponis Bahá'u'lláh por altenlevi kaj progresigi la socion kaj por ĉesigi sistemojn de dominado kaj ekskludado, estas nun ĝenerale akceptitaj. Konsideru Lian instruon ke la homaro estas unu popolo, aŭ ke virinoj egalrangas kun viroj, aŭ ke edukado devas esti universala, aŭ ke racia enketado de la vero devas venki vantajn teoriojn kaj antaŭjuĝojn. Tra ĉiuj landoj granda segmento de la monda populacio nun konsentas kun ĉi tiuj fundamentaj valoroj.

Tamen, ankaŭ argumentoj kontraŭ tiuj ĉi valoroj, antaŭe troviĝintaj nur je la marĝenoj de serioza pensado, revigliĝas en la socio – rememorigo pri tio ke idealoj bezonas la forton de spirita sindevontigo por ilin cementigi. Ĉar estas unu afero ion principe agnoski; estas sufiĉe alia afero ĝin tutkore adopti, kaj eĉ pli malfacilas tiel transformi la socion, ke ĝi donas kolektivan esprimon al tio. Sed ĝuste tio estas la celo de tra la tuta terĝlobo nove aperantaj komunumoj formitaj laŭ la instruoj de Bahá'u'lláh. Ĉi tiuj komunumoj strebas fokusi la lumon de tiuj instruoj sur la kronikajn problemojn afliktantajn la sociojn ĉirkaŭ si; ili ellaboras programojn de praktika agado centritajn je spiritaj maksimumoj. Tiuj estas komunumoj, kiuj pledas por la edukado de kaj knabinoj kaj knaboj sub ĉiaj kondiĉoj; kiuj apogas pli vastan koncepton de deservado, kiu inkluzivas laboron faritan en spirito de servado; kiuj konsideras spiritajn aspirojn, prefere ol la proprajn interesojn, kiel la ĉiam-spruĉantajn fontojn de motivo; kaj kiuj ensemas sindediĉon al la antaŭenigado de individua kaj socia transformado. Ili provas efektiviĝi spiritan, socian, kaj materialan progreson samtempe. Antaŭ ĉio jen komunumoj, kiuj difinas sin mem pere de sia sindevontigo al la unueco de la homaro. Ili atestimas la riĉan diversecon reprezentitan per ĉiuj popoloj de la mondo, asertante ke onies identeco kiel membro de la homaro havas prioritaton super aliaj identecoj kaj asociiĝoj. Ili konfirmas la neceson de tutmonda konscio devenanta el komuna zorgo pri la bonfarto de la homaro, kaj ili konsideras ĉiujn popolojn de la tero kiel spiritajn gefratojn. La adeptoj de Bahá'u'lláh, ne kontentaj simple aparteni al tiaj komunumoj, konstante klopodas inviti similpensantajn animojn kuniĝi kun ili je lernado pri kiel Liajn instruojn efektiviĝi.

Per tio ni venas al la kerno de nia argumentado. Ĝi estas defia kaj postulas paroli honeste. Estas multaj noblaj kaj admirindaj aferoj en la mondo, kaj ili devenas de apartaj perspektivoj, ĉiu kun sia propra merito. Ĉu la Kozo de Bahá'u'lláh estas simple unu inter ili? Aŭ ĉu ĝi estas universala, enkorpiganta la plej altajn idealojn de la tuta homaro? Kiel ajn, Kozo kiu estu la fonto de daŭriva justeco kaj paco – ne por unu loko aŭ unu popolo, sed por ĉiuj lokoj kaj ĉiuj popoloj – devas esti neelĉerpebla, devas posedi ĉielan vivecon, kio permesas al ĝi transcendi ĉiajn limigojn kaj ampleksi ĉiujn dimensiojn de la vivo de la homaro. Finfine devas ĝi posedi la potencon transformi la homan koron. Tial, kiel la gasto de Báb, observu ni atente. Ĉu ne la Kozo de Bahá'u'lláh posedas ĝuste tiujn ĉi kvalitojn?

Se la instruoj alportitaj de Bahá'u'lláh estas kio ebligas al la homaro avanci al la plej altaj niveloj de unueco, devas oni esplori sian animon por la ĝusta respondo. La homamasoj kiuj rekonis Bábon estis alvokitaj al heroeco, kaj ilian imponegan respondon registris la historio. Ĉiu konscia pri la kondiĉoj de la mondo kaj pri la persistantaj egaj misoj, kiuj tordas la vivojn de ĝiaj enloĝantoj, atentu pri la voko de Bahá'u'lláh al sindona kaj firma servado – la heroeco por la hodiaŭa epoko. Kio alia savos la mondon krom la penadoj de sennombraj animoj farantaj la bonfarton de la homaro sian ĉefan, sian superregantan zorgon?

[signita: La Universala Domo de Justeco]